

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por $\frac{1}{2}$ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por $\frac{1}{32}$ de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeek en Nurnbergo.

No. 1.

Nurnbergo, Januaro 1891.

Jaro II.

Al la nova jaro.

Al ĉiuj niaj amikoj en diversaj landoj kaj urboj ni sendas per ĉi nian koran gratulon je la veninta nova jaro. Ni esperu, ke tiu ĉi jaro alportos al nia afero grandan forton kaj proksimigos ĝin per paŝoj grandegaj al la ideala celo. Se ni ekmemoros, en kia malfavora tempo naskiĝis nia afero kaj kun kiaj grandegaj malfacilaĵoj ĝi devis batali en siaj unuaj kelkaj jaroj de ekzistado; se ni vidas, ke malgraŭ ĉio la afero ĉion kuraĝe eltenis kaj stariĝis fine sur fortaj piedoj, sur vojo promesanta nun regulan progresadon, — ni povas diri, ke ni havas la rajton kuraĝe kaj kun la plej bonaj esperoj rigardi en la estontecon.

Pri nia programo en la nuna jaro ni ne bezonas paroli, ĉar la legantoj ĝin jam scias. Ni diros nur, ke ni irados konstante laŭ la vojo, kiun ni unu fojon elektis, kaj nenia forto igos nin fariĝi malfidela al la afero, el kiu ni faris la celon de nia vivo. La graveco de nia afero estas nia fera ŝildo, kaj laborado, konstanteco kaj pacienco, pacienco, konstanteco kaj laborado, konstanteco, laborado kaj pacienco estas la fortoj, per kiuj ni devas venki, se eĉ granda parto de la nun disŝutata semo ŝajnas perdata. Al diversaj personoj, al kiuj nia celo ŝajnas neatingebla, ni povas diri, ke nenio en la mondo estas neatingebla por kolekto da personoj, kiuj, konsciante la tutan gravecon de sia afero, decidis malgraŭ ĉiuj cirkonstancoj neniam ripozi, ĝis ili venos al la celo.

La amikojn de nia afero ni invitas al eble plej frua abonado de nia organo kaj ni petas ilin zorgi pri ĉiam novaj abonantoj. Ni revokas en la memoron de niaj amikoj, ke de la stato de nia organo dependas la stato de nia afero. Plenumante la peton de kelkaj abonantoj, ni decidis akceptadi ankaŭ abonon por $\frac{1}{2}$ jaro (de Januaro ĝis Julio kaj de Julio ĝis Januaro); sed kiu povas, tiu faros pli bone, se li abonos per unu fojo por tuta jaro.

La malhelpoj, kiuj en la lasta tempo kaŭzis neregulecon en la elirado de la numeroj, nun estas jam forigitaj. Se iu el la abonantoj ricevos la gazeton neakurate, ni petas lin skribi al ni pri tio ĉi, por ke ni povu rebonigi tiun ĉi neakuratecon. Nia gazeto elirados nun regule unu fojon en la monato kaj ĝia grandeco komencante de la nuna numero estos duobla, t. e. ĉiu numero enhavos 8 paĝojn.

Pri la alfabeto.

La alfabeto de nia lingvo konsistas el 28 literoj, kiuj servas por esprimi la sonojn la plej multe komunajn al ĉiuj plej gravaj lingvoj. Tiuj ĉi 28 sonoj ne ekzistas ie aparte en formo difinita kaj severe limita; ili estas post longa pripensado kaj provado elektitaj el la grandega nombro da diversaj sonoj trovataj en la diversaj homaj lingvoj. Enpreni en nian lingvon ĉiujn sonojn, kiuj ekzistas en ĉiuj lingvoj, estus absolute ne eble, kaj se ĝi eĉ estus eble — ĝi estus tute neoportune. La nombro de la sonoj estas tute senlima kaj la nuancoj de unu sama sono en malegalaj lingvoj estas tiel multaj, tiel malfacile difineblaj aŭ diferenceblaj, ke neniu, se li eĉ konus perfekte ĉiujn lingvojn de la tuta mondo, neniam povos diri eĉ proksimume, kiom da sonoj ekzistas en la homaj lingvoj. Se la nombro de la sonoj eĉ estus difinebla, ellerni ilin ĉiujn kaj diferencigi en la uzado estus preskaŭ tute neeble eĉ por la plej granda instruitulo, kiu volus oferi al la lernado de la alfabeto mem tre multe da tempo kaj havus la plej delikatan orelon kaj la plej flekseblajn organojn de parolado.

El la senlima nombro da sonoj ĉiu ekzistanta lingvo elektis por si nur certan difinitan kolekton kaj ĉiujn aliajn forĵetis. Tiel ni devis fari ankaŭ kun nia lingvo: ni elektis certan nombron da sonoj, kiuj formis la alfabeton de nia lingvo, kaj ĉiuj ceteraj sonoj ne trovis uzadon en nia lingvo. Neniu dubos, ke alie ĝi tute ne povis esti farita, se ni ne volis, ke nia lingvo estu scienca ludilo interesa eble por 2—3 personoj en la tuta mondo, sed tute ne uzebla por la granda publiko kaj havanta nenian praktikan taŭgon.

Tiel la lingvo Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo, havas klare difinitan nombron da sonoj aŭ literoj kaj nenia nova vorto en tiu ĉi lingvo devas esti kreata el sonoj, kiuj sin ne trovas en la kadro de ĝia alfabeto. Obei tiun ĉi principan regulon en la kreado de vortoj estas afero tiel simpla kaj facila, ke ni ne bezonas tute pri ĝi paroli. Sed iafoje ni estas en tia situacio, ke ni devas uzi fremdajn sonojn, kiuj ne havas por si literon en nia alfabeto (tiu ĉi situacio dependas kompreneble ne de la speciala konstruo de nia lingvo, sed ĝi havas lokon ankaŭ kun ĉiu alia lingvo); ĝi estas tiam, kiam ni devas uzi ian nacian nomon (personan, geografian k. c.) aŭ kiam ni volas esprimi per literoj la precizan sonadon de fremda vorto. Kion ni tiam devas fari? Por la unua tempo, ĝis tiu ĉi demando estos tute difinita kaj firme decidita per la uzado, ni konsilas agi en la sekvanta maniero:

I. Se ni volas esprimi ian nacian nomon, kiu havas en si fremdajn literojn kaj kiu estas grava por ni nur per sia

signifo kaj ne per la maniero de sia sonado, ni uzas ĝin jene: a) aŭ ni uzas la nomon en tiu sama formo, en kiu ĝi estas uzata en sia propra lingvo, kaj ni lasas al la legantoj elparoli la nomon kiel ili volas (ekzemple „Fürth“ [urbo en Bavarujo], „Göthe“); b) aŭ ni uzas ĝin laŭ la ortografio kaj fonetiko Esperanta, t. e. ni esprimas la nomon per la sonoj kaj literoj uzataj en nia lingvo (ekzemple „Vjazma“ [urbo en Rusujo], „Puŝkin“); c) aŭ ni donas al la nomo karakteron pure Esperantan, t. e. ekster la ortografio kaj fonetiko Esperanta ni donas al ĝi ankaŭ la gramatikajn formojn de nia lingvo (ekzemple „Nurnbergo“, „Rejno“). Ĉiuj 3 diritaj manieroj estas uzataj ankaŭ en ĉiuj ekzistantaj lingvoj. La unuan manieron ni uzas ordinare tiam, kiam la fremda nomo en ĝia nacia lingvo estas skribata per alfabeto egala al nia propra (tiel ekzemple ĉiuj popoloj uzantaj alfabeton latinan skribas: „Manchester“, „Byron“, kvankam tiuj ĉi nomoj estas elparolataj tute alie, ol postulas la reguloj de legado de la diritaj nacioj); la dua maniero estas uzata, kiam la nacio doninta la nomon kaj la nacio uzanta ĝin havas alfabetojn malegalajn kaj la figura litera imitado de la nomo estas jam ne ebla aŭ ne bezona (ekzemple la rusoj skribas [per siaj literoj] „Šekspir“ kaj ne „Shakespeare“, la germanoj skribas „Newa“, kvankam la rusoj mem skribas kaj elparolas sian riveron preskaŭ „Njeva“); la tria maniero estas uzata por tiuj nomoj, kiuj estas gravaj aŭ ofte ripetataj kaj okupis jam difinitan lokon en la vortaro de nia propra lingvo sub formo ellaborita per longa uzado (ekzemple „Varsovie“ aŭ „Warschau“ anstataŭ „Warszawa“, „Lissabon“ aŭ „Lisbonne“ anstataŭ „Lisboa“). Kian el la diritaj 3 manieroj oni devas uzi en la lingvo „Esperanto“ kaj en kiaj okazoj ilin uzi — ni ne povas ankoraŭ diri decide, ĉar tiu ĉi demando estas tre malfacile solvebla kaj tre multe disputebla, kaj tial ni lasas nun ankoraŭ ĝian solvon al la forto de la tempo kaj uza sankciado, kiel en ĉiuj aliaj ekzistantaj lingvoj, kaj al la volo de la uzantoj mem. Post kelka tempo, kiam la literaturo de nia lingvo riĉiĝos, la dirita demando estos solvita per si mem en la sekvanta maniero: aŭ iom post iom per la uzo ellaboriĝos Esperanta vortaro geografia, historia k. c., kiel ni ĝin vidas en ĉiu alia lingvo, aŭ estos proponita kaj akceptita ia bona difinita komuna regulo por la uzado de ĉiuj nomoj. La plej atendebla kaj ankaŭ la plej bona kaj celinda estas la lasta maniero, kaj kredeble poste ĉiuj nomoj estos uzataj fonetike laŭ la sonaro kaj ortografio kaj kun karaktero pure Esperanta, t. e. el la 3 manieroj, pri kiuj ni parolis supre, kun la tempo sendube enfortikiĝos nur unu sola por ĉiuj nomoj — la maniero tria. Tamen pro diversaj kaŭzoj ni devas por la unua tempo lasi ankoraŭ al ĉiu esperantisto liberan elekton inter ĉiuj 3 diritaj manieroj. Ni permesas al ni nur doni kelkajn konsilojn por la elektado de tiu aŭ alia maniero:

a) laŭ la maniero unua ni konsilas uzadi la nomojn familiajn de ĉiuj personoj (esceptinte tiujn, kiuj mem esperantigas sian nomon) kaj tiujn nomojn geografiajn, kiuj, estante ne gravaj kaj ne ofte renkontataj, ne povas esperi baldaŭ kutimiĝi la publikon al sia formo pure Esperanta, aŭ kies ortografio nacia estas tiel malegala je la ortografio Esperanta, ke akceptinte formon Esperantan ili riskas fariĝi tute nerekoncibleblaj por la legantoj;

b) laŭ la maniero dua ni konsilas uzadi ĉiujn nomojn, kiuj en sia lingvo estas skribataj per alfabeto ne latina kaj tial ne riskas, ke en ortografio Esperanta ili fariĝos nerekoncibleblaj aŭ strangaj*);

c) laŭ la maniero tria ni konsilas uzadi ĉiujn nomojn geografiajn, kiuj, estante gravaj kaj ofte renkontataj, povas esti rigardataj preskaŭ kiel vortoj en nia vortaro kaj, estante

*) Se ni la rusajn adresojn de niaj amikoj skribas ordinare laŭ ortografio germana, franca k. s., ni faras ĝin pro celoj poŝtaj.

ofte ripetataj, prezentus dissonancon en nia lingvo, se ili ne havus karakteron pure Esperantan.

Niajn konsilojn ni donas ne kiel reguloj, sed nur kiel rimedo por paciĝi la logikon kun la tradicio, kun kiu rompi subite per unu fojo estus iom danĝere. Sed por kiu la skribado laŭ 3 diversaj manieroj estas malfacila, aŭ kiu dubas, kiun manieron uzi por tiu aŭ alia nomo, — tiu ĉiam faros la plej bone, se li uzos la manieron trian, ĉar tiu ĉi maniero de uzado estas ĉiam bona kaj regula kaj, kiel ni jam diris, poste kun la tempo ĝi kredeble fariĝos la sola maniero de uzado por ĉiuj nomoj.

II. Sed iafaje ni estas en la situacio, ke ni devas esprimi ne la signifon de ia nomo aŭ fremda vorto, sed ĝian precizan sonadon, kaj tiam ni devas figure prezenti sonojn, kiuj en nia alfabeto ne havas por si literojn. Kion tiam fari? Tio ĉi ne estas speciala demando de nia lingvo, ĝi estas egala demando por ĉiuj ekzistantaj lingvoj kaj en neniu el ili ĝi estas ankoraŭ solvita ĝis nun. Nenia lingvo ĝis nun havas la eblon prezenti precize ian vorton, en kiu sin trovas sonoj fremdaj por tiu ĉi lingvo. Ne parolante jam pri la sonoj de naciotoj malgrandaj kaj malproksimaj, eĉ la sonojn de la nacioj plej gravaj kaj plej najbaraj neniu el niaj lingvoj povas prezenti; tiel ekzemple la slavoj povas precize prezenti preskaŭ neniun vorton el la lingvoj romana-germanaj, kaj tiuj ĉi lastaj — preskaŭ neniun vorton slavajn; eĉ la slavaj popoloj inter si kaj la romana-germanaj inter si ne havas la eblon precize esprimi skribe la vortojn unuj de la aliaj.

Sed en la lingvo Esperanto tiu ĉi granda, kvankam natura, manko ekzisti ne devas. La celo de nia lingvo estas servi kiel ligilo inter la popoloj kaj tial ĝi devas havi la eblon esprimi la sonojn de ĉiuj lingvoj. Ni jam diris, ke enpreni ĉiujn sonojn en nian alfabeton estus tre maloportune, — kontraŭe, en la alfabeto ellernota de ĉiuj esperantistoj devas sin trovi sonoj nur tute klaraj, difinitaj, por ĉiuj bone ellerneblaj kaj elparoleblaj; sed ekster la alfabeto pure Esperanta ni devas havi ankoraŭ provizan alfabeton por fremdaj sonoj; tiu ĉi proviza alfabeto por la amaso de Esperantistoj estas tute ne bezona kaj neniu devas ĝin lerni; ĝi ekzistas nur por la filologoj kaj servas al ili kiel kondiĉa rimedo por esprimi klare kaj unuforme la sonojn ne trovatajn en nia lingvo. Sendube tia proviza alfabeto, perfekta kaj plena, iom post iom estos kreita de personoj pli kompetentaj ol ni, kaj por ebligi tiun ĉi kreadon ni petas niajn amikojn sendi al ni siajn konsilojn kaj opiniojn tuŝante tiun ĉi demandon. Sed ĉar sendube ĝis la fina kaj firma kreiĝo de tia perfekta proviza alfabeto pasos ankoraŭ longa tempo kaj ni dume jam nun devas havi ian unuforman manieron de esprimado por la diversaj fremdaj sonoj, tial ĝis tiu tempo ni proponas nian propran sistemon por la plej gravaj fremdaj sonoj. En la ricevotaj proponoj, kiujn ni kredeble presados en nia gazeto, tiuj samaj sonoj estos sendube esprimataj en alia maniero, ol la nia; sed por eviti konfuzon kaj malegalan komprenadon de la samaj sonoj, ni petas niajn legantojn memori, ke malgraŭ ĉiuj presotaj teoriaj proponoj nia sistemo restos neŝanĝita kaj netuŝebla ĝis ia alia sistemo oficiale okupos ĝian lokon. Por la okulo nia sistemo estas iom neoportuna; multe pli bone estus krei por la fremdaj sonoj novajn literojn aŭ doni certajn signetojn al la literoj jam ekzistantaj; sed ĉar tiuj ĉi literoj estas uzataj tre malofte, tial neniu presisto volos prepari por ili apartajn tipojn kaj tiel ilia uzado en okazo de bezono estus praktike necbla. Tial ni signas la fremdajn sonojn per literoj en krampoj. Ni parolos tie ĉi nur pri la fremdaj sonoj plej gravaj.

1) La germanaj sonoj **ä, ö, ü** (la francaj **ai, è, eu, oeu, u**) estas esprimataj per **a(e), o(e), u(e)**;

2) la molaj konsonantoj (ekzemple en la lingvoj slavaj) estas esprimataj per **(j)** post la konsonanto;

- 3) la malmolaj konsonantoj — per (u) post la konsonanto;
 4) la naza n (franca, pola) — per n(g);
 5) la angla th en „think“ — per t(h);
 6) la angla th en „father“ — per d(h);
 7) la meza sono inter a kaj o — per a(o).

Per la montritaj malmultaj signoj, kiujn ellerni kaj memori estas afero tre facila, ni povas esprimi tute klare kaj precize preskaŭ ĉiujn sonojn de ĉiuj eŭropaj lingvoj, malgraŭ ke tiuj lingvoj mem por ilia esprimado uzas tre grandan nombron da diversaj signoj kaj multon da tre malfacilaj „reguloj de legado“. Se ni ekzemple volas precize esprimi la germanan tradukon de „urso“, „leono“, „dolĉa“, la rusan de „glacio“, „morto“, „estis“, la anglan de „pensi“, „patro“, „bone“, la francan de „mia“, la polan de „cigno“, „klafto“ k. c., — ni skribos: „ba(e)r“, „lo(e)ve“, „zu(e)s“, „l(j)od“, „sm(j)ert(j)“, „b(u)il(u)“, „t(h)ink“, „fad(h)er“, „ŭel“, „mon(g)“, „l(u)aben(g)dz(j)“ (oni elparolas ankaŭ alie — „l(u)aben(g)dj(j)“, „son(g)jen(j)“ k. c.

Ankaŭ per la akcento kaj per malegala longeco de la vokaloj multaj lingvoj diferencas de nia lingvo. Tion ĉi ni esprimos per la signoj, kiuj ordinare estas uzataj por tiu ĉi ekzemple; à, ā, ä.

La vojevodo.

De A. Mickiewicz.

En vespero somera vojevodo kolera
 Al la hejma kastelo rapidas.
 Al la lito edzina kun teruro senfina
 Li alvenas, — neniun li vidas.

En doloro brulanta kaj per mano tremanta
 Sian grizan lipharon li prenis,
 De la lito foriris, la manikojn retiris
 Kaj ektondris — kozako alvenis.

„Kial, best' abomena, mia pordo ĝardena
 Restas nokte sen hundo, sen gardo?
 Prenu tuj mian sakon kaj pafilon kozakan
 Kaj silente min sekvu, bastardo!“

Kun pafil' en la mano al ĝardena altano
 Ili ambaŭ sen bru' alŝteliĝas.
 Sur la benka herbaĵo ia lumas blankaĵo:
 En tolaĵo virino vidiĝas.

Unu manon levinte, la okulojn kovrinte,
 Per la dua forpuŝi ŝi penis
 Unu viron petantan surgenue starantan,
 Kiu nun en la brakoj ŝin tenis.

Kaj en flama fervoro li parolis: „Ho, koro,
 Ĉu jam ĉio por ĉiam perdita?
 Eĉ la premoj de l' mano per la mon' de l' tirano
 Ĉiuj estas jam forĉetigitaj?“

Mi vin tiel amadis, por vi tiel bruladis, —
 Malproksime nun plori mi devas;
 Li ne amis, ne ploris, nur per mon' eksonoris, —
 Kaj li ĉion por ĉiam ricevas.

Sur la brusto anĝela lia kapo malbela
 En dorloto de nun ripozados,
 De la roza buŝeto, de la ruĝa vangeto
 Li ĉielan feliĉon suĉados.

Sur ĉevalo fidela en vetero kruela
 Mi rapidas al mia anĝelo —

Por sopiro foriri kaj al vi nur deziri
 Bonan nokton en lia kastelo . . .“

Ŝi silentas senmove; li komencas denove
 Sian plendon kun petoj kaj ploro,
 Ĝis, la brakojn lasinte, la konscion perdinte,
 Ŝi defalis al li al la koro.

En l' arbajo silente, aŭskultante atente,
 Staras ambaŭ gardantoj kovritaj,
 Ili staras genuc, en la manoj senbruc
 La pafiloj ekstremis ŝargitaj.

„Estro!“ diris kozako, „ia stranga atako
 Al mi ligas subite la manon;
 Brulan sentis mi larmon kaj skuantan malvarmon.
 Kiam tuŝi mi volis la ĉanon.“

— „Pesto! mi vin jam skuos, mi vin plori instruos!
 Jen saketo kun polvo: sen vorto
 Vi preparos, vi pafos, kaj se ŝin vi ne trafos,
 Mi edzigos vin mem kun la morto.“

„Supren, dekstren, senskue! Mi okpafos, — l' unue
 De l' amanto diskrevu la koro.“
 La servanto ektiris, kaj la kuglo eniris
 En la frunton de . . . lia sinjoro.

L. Z-f.

Lorelej' *).

De Heine.

Ne scias mi, kial subita
 Malgaj' en la koro naskiĝis;
 El tempo jam enterigita
 Legendo al mi reviviĝis.
 Jam malvarmetiĝas l' aero.
 La Rejno mallaŭte babilas,
 Per oro de l' sun' en vespero
 La supro de l' monto rebrilas.
 Plej belan knabinon mi vidas:
 En ora ornamo brilante
 Sur supro de l' monto ŝi sidas,
 La harojn mistere kombante.
 La oran kombilon ŝi movas
 Kaj kantas tra l' pura aero,
 Kaj forto mirinda sin trovas
 En tiu ĉi kant' de l' vespero.
 Sipeť iras sur la rivero,
 Ŝipisto ekstremis de l' kanto,
 Kaj blinda por ĉia danĝero
 Rigardas li al la kantanto.
 Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
 Perdiĝis sub l' akvoturnado, —
 Ĝin Lorelej' faris, kruela,
 Per sia mirinda kantado.

L. Z-f.

Cigno, ezoko kaj kankro.

El Krilov.

Se inter kolegoj jam en la komenco
 En ia afero malestas konsento,
 Senfrukta restados ilia intenco,
 Anstataŭ afero nur estos turmento.
 Okazis, ke kankro kun cigno, ezoko

*) Lorelej' estas la nomo de ŝtona altaĵo super unu loko de la rivero Rejno. La legendo diras, ke tie sidas bela nimfo, kiu per sia kantado allogas la ŝipistojn kaj pereigas ilin.

Por ŝarĝon transporti de loko al loko
 Triope al veturigil' enjungiĝis
 Kaj tre diligente de l' loko tiriĝis.
 Sed malgraŭ ilia grandega fervoro
 Nenion alportis ilia laboro.
 Ekstreme facile ĝi estus por trio,
 Se ili laborus nur en harmonio;
 Sed al la ĉielo la cigno sin tiras,
 La kankro obstine returne foriras,
 L' ezoko al l' akvo la ŝarĝon kunŝiras.
 Nun kiun pravigi kaj kiun kulpigi,
 Mi certe kaj tute ne povus klarigi, —
 Sed la veturilo eĉ paŝon ne faris,
 Ankoraŭ ĝi staras nun, kie ĝi staris.
 M. Goldberg.

Embaraso.

(El germane.)

Mi volus al vi diri ion,
 Sed kion, mem ne scias mi,
 Kaj se vi min demandus tion
 Mi nur respondus tion-ĉi:
 El tuta kor' mi amas vin.
 Nur sole vin, nur vin!

Se kanti kanton mi ekprovas
 Irantan al vi al la kor'
 Mi sole unu vorton trovas
 En la anim' je ĉia hor':
 El tuta kor' mi amas vin,
 Nur sole vin, nur vin!

Mi skribus al vi leteron
 Malkovrus mian kor' en ĝi;
 Tro malfacile! Nur vorteton
 Mi skribas kaj ne scias pli:
 El tuta kor' mi amas vin
 Nur sole vin, nur vin!

A. Gr...i.

Kjaĥta, en Aŭgusto 1890.

Plena vortaro nacia internacia ĝis nun estas eldonita nur por Rusoj; por aliaj nacioj ekzistas nur fundamentaj vortaroj, kvankam plena vortaro estas egale necesa por ĉiuj. La vortoj, kiuj estas trovataj en la „Malgranda Vortaro“, ne estas sufiĉaj; estas sentata bezono de novaj vortoj, sed anstataŭigi ilin per tiuj vortoj, kiuj sin trovas en tiu ĉi vortaro, estas tre malfacile kaj por multaj neeble. Por traduki poeziajn verkojn plena vortaro estas necesa senkondiĉe, ĉar oni devas traduki tiajn verkojn kiel eble pli proksime al la originalo.

Estas bezone, ke en plena vortaro estu trovataj la vortoj kunmetitaj (ĉion ĉi faris D-ro Esperanto en sia „Plena vortaro rusa-internacia“) — bezone, ĉar multaj ne povas regule kreadi tiajn vortojn kaj en ĉia okazo tio ĉi postulas multe da laboro.

D-ro Esperanto verkis la „Plenan vortaron rusa-internacian“. La personoj, kiuj konas la lingvon rusan, devas kun helpo de tiu ĉi plena vortaro pretigi plenan vortaron franca-internacian. La lingvo franca estas konata de ĉiu bone edukita homo, kaj tial, kiam estos preta vortaro por Francoj, eldoni ĝin por aliaj nacioj estos jam tute ne malfacile.


Oni bezonas plenajn vortarojn internacia-naciajn, por ke la legado de l' verkoj en Esperanto estu ebla por ĉiuj. Se estos eldonitaj vortaroj nacia internaciaj, pretigi vortarojn returnitajn estos jam tre facile. (Mi jam finis plenan vortaron internacia-rusan; ĝi kostos 1 rublon kaj la tuta enspezo estos oferita al nia afero).

La lingvo Esperanto estas ellernata sen instruanto, kaj tial, por ke la lernantoj sciu, ĉu ili bone komprenas la regulojn, ĉu ili bone tradukas, estas necese eldoni naciajn tradukojn de kelkaj verkoj en Esperanto. D-ro Zamenhof eldonis tradukojn de la „Dua Libro“ kaj de la „Aldono“ en la lingvo rusa; estas tre bezone, ke aliaj nacioj havu almenaŭ la tradukon de la „ekzercoj“, kiuj sin trovas en la „Dua Libro“: per ili la lernantoj komprenos la tutan konstruon de la lingvo Esperanto. Ankaŭ tiun ĉi tradukon estus bone eldoni antaŭ ĉio en la lingvo franca.
 J. Puĉkovski.

Fingra kalendaro.

Originale verkita de J. Grohn, privata instruisto.

Rigardu tiun ĉi figuron, kiu prezentas la montran fingron de la maldekstra mano,



sur kiu la lokoj de fleksoj kaj la fineto de la fingro estas signitaj per sep literoj A, B, C, D, E, F, G. Tiuj ĉi sep punktoj prezentas la sep tagojn de semajno. Ĉiu devas sur sia propra fingro signi tiujn ĉi punktojn en penso per tiuj ĉi sep literoj kaj en tiu sama ordo, kiel ni vidas sur la figuro.

Antaŭ ol ni iros pli malproksime, ni devas bone lerni parkere la sekvantan frazon sisteman, sen kiu oni ne povas uzi nian fingran kalendaron:

Alta Dia dono,
 Granda ben', espero!
 Gvidu ĉion firme
 Al dezira fino.

Tiu ĉi frazo estas kunmetita el dekdu vortoj, kies unuaj literoj montras al ni, de kiu punkto sur la fingro ĉiu monato komencas kalkuli siajn tagojn.

Jen estas la sistemo monata:

La	1 ^a monato (Januaro)	komencas de la punkto A (Alta)
"	2 ^a " (Februaro)	" " " " D (Dia)
"	3 ^a " (Marto)	" " " " D (dono)
"	4 ^a " (Aprilo)	" " " " G (granda)
"	5 ^a " (Majo)	" " " " B (ben')
"	6 ^a " (Junio)	" " " " E (espero)
"	7 ^a " (Julio)	" " " " G (gvidu)
"	8 ^a " (Aŭgusto)	" " " " C (ĉion)
"	9 ^a " (Septembro)	" " " " F (firme)
"	10 ^a " (Oktobro)	" " " " A (al)
"	11 ^a " (Novembro)	" " " " D (dezira)
"	12 ^a " (Decembro)	" " " " F (fino).

Se Vi volas scii, kial la sistemo monata devas esti difinita tiel kaj ne ne alie, kalkulu sur la punktoj de la fingro kaj Vi vidos, ke se la monato Januaro, havanta 31 tagojn, komenciĝas de la punkto A („Alta“), ĝi finiĝas sur la punkto C; la dua monato, Februaro, havanta 28 tagojn (en jaro simpla) komenciĝas de la punkto D (ĉar la 31a de Januaro estis c) kaj finiĝas sur C; la tria monato, Marto, komencas kalkuli siajn tagojn de la punkto D, k. c. (Pri superjaro, t. e. jaro 366-taga ni parolos poste.)

Rimarko. Ĉe kalkulado ĉirkaŭ la fingro oni povas facile vidi, ke la datoj 8a, 15a, 22a kaj 29a de ĉiu monato ĉiam falas sur tiun saman punkton, de kiu la monato komenciĝas.

Ekzemplo 1a. De kiu punkto komenciĝas Aprilo? — Solvo: Aprilo, la kvara monato, komenciĝas de la punkto, kiu estas signata per l'unua litero de la kvara vorto de la frazo (G).

Ekzemplo 2a. Sur kiu punkto sin trovas la 5a de Novembro? — Solvo: Al Novembro, la deknua monato

respondas la dekunua vorto de la frazo („Dezira“) kaj tiel la punkto D estas l' unua, E la dua, F la tria, G la kvara kaj A estas la kvina tago de Novembro.

Ekzemplo 3a. Sur kiu punkto sin trovas la 23a de Junio? — Solvo: Al Junio, la sesa monato, respondas la sesa vorto de la frazo („Espero“) kaj tiel la punkto E estas la 1a, 8a, 15a kaj 22a kaj F estas la 23a tago de la monato Junio.

Nun ni vidas, kiun nomon de tago semajna ĉiu punkto de la fingro devas havi:

Ekzemplo 4a. Ni elserĉu la punkton de la hodiaŭa tago, supozante, ke hodiaŭ estas ĵaŭdo la 8a de Majo de tiu ĉi jaro (1890). Rimarko. Kiu lernas tiun ĉi kalendaron, ne devas sin teni je nia supozita tago, nombro kaj monato, ĉar ĝi estos pli klare kaj pli kompreneble, se li prenos por ekzemplo la daton kaj la nomon de tiu tago, en kiu li lernas, kaj solvos sian ekzemplon konforme je la sekvanta solvo). — Solvo: Al Majo, la kvina monato, respondas la kvina vorto de la frazo („Ben“), kaj tiel la punkto B estas la 1a kaj la 8a de Majo; kaj ĉar ni scias, ke tiu ĉi tago estas ĵaŭdo, ni facile konkludas, ke la punkto B estas ĵaŭdo, C — vendredo, D — sabato, E — dimanĉo, F — lundo, G — mardo kaj A — merkredo. Tiuj ĉi nomoj de tagoj restas por la punktoj por tiu ĉi tuta jaro 1890.

Rimarko. Por ne ŝarĝi la memoron, estas sufiĉe nur memori la punkton de dimanĉo, kaj el la antaŭiranta solvo ni vidas, ke por tiu ĉi jaro (1890) la punkto E estas la dimanĉo.

En la sekvanta jaro la nomoj de la tagoj transiras sur la antaŭirantajn punktojn, kaj ĝi fariĝas pro jena kaŭzo: se la simpla jaro havus nur precize 52 semajnojn, ĝi komenciĝus de la punkto A (en nia jaro — merkredo) kaj finiĝus sur la punkto G (mardo), kaj la estonta jaro komenciĝus rec de A kaj la tagoj por la punktoj restus tiuj samaj sen ŝanĝo; sed bedaŭrinde la jaro ekster 52 plenaj semajnoj havas ankoraŭ unu superfluan tagon, sekve ĝi ne povas finiĝi sur la punkto G (mardo), sed ĝia fino estos A (merkredo) kaj la estonta jaro devas komenciĝi de la sekvanta tago (ĵaŭdo), sed ne de la sekvanta punkto B, ĉar la sistemo monata postulas por la monato Januaro la punkton A („Alta“). Por konsentigi tiujn ĉi du postulojn (ke la estonta jaro komenciĝu de la punkto A kaj de ĵaŭdo), oni devas diri, ke kun la komenco de nova jaro la ordo de la nomoj de tagoj por la punktoj de la fingro ĉesiĝas kaj komenciĝas nova ordo, tio estas: la punkto A akceptas la nomon de la tago, kiun la punkto B ĝis tiu tempo havis. Sekve, vidante ke en tiu ĉi jaro 1890 B estas ĵaŭdo, ni scias, ke kun la komenco de la estonta jaro A estos ĵaŭdo kaj la punkto dimanĉa anstataŭ E en la estonta jaro estos D.

Nun estas ankaŭ facile kompreni, ke por la 29a tago de Februaro en superjaro devas veni tia sama ŝanĝo de la nomoj de tagoj por la punktoj de la fingro. Nia sistemo kalendaro estas verkita por jaro simpla, en kiu la monato Februaro havas nur 28 tagojn kaj tiel, komenciĝante sur la punkto D, tiu ĉi monato finiĝas sur C kaj la sekvanta monato Marto komenciĝas de la punkto D. Sed ĉar en superjaro Februaro havas ankoraŭ unu tagon, sekve ĝi ne povas finiĝi sur C, sed devas finiĝi sur D kaj la sekvanta monato devas komenciĝi de la sekvanta tago, sed ne de la sekvanta punkto E, ĉar la sistemo monata postulas por la monato Marto la punkton D. Sekve ni vidas, ke por konsentigi tiujn ĉi 2 postulojn (ke la monato Marto komenciĝu de la punkto D kaj de la sekvanta tago), ni devas diri, ke en la komenco de Marto la antaŭa ordo de la nomoj de tagoj por la punktoj sur la fingro ĉesiĝas kaj en la komenco de Marto en superjaro la punkto D akceptas la nomon de la tago, kiun la punkto E ĝis tiu tempo havis. Sekve, transirante de jaro simpla en sekvantan superjaron, ni havas 2 ŝanĝojn de la nomoj de

tagoj por la punktoj: unu fojon por Januaro kaj Februaro kaj la duan fojon por la lastaj 10 monatoj. Tiel en tiu ĉi jaro 1890 la dimanĉo estas sur la punkto E, en l' estonta jaro 1891 ĝi estos sur D kaj en la superjaro 1892 la dimanĉo estos sur C por la unuaj du monatoj kaj sur B por la lastaj dek; tio estas: la nomoj de tagoj sin ŝovas posten en returnita ordo de l' alfabeto.

Rimarko. El tiu ĉi klarigo estas facile kompreni, ke se oni volas serĉi ian tagon en pasinta tempo, oni devas ŝovi la nomojn de tagoj por ĉiu jaro en rekta alfabeto ordo: tio estas, se en tiu ĉi jaro 1890 la punkto dimanĉa estas E, sekve en la pasinta jaro 1889 ĝi estis F kaj en 1888 (superjaro) la punkto dimanĉa estis G por la lastaj dek monatoj kaj A por la unuaj du monatoj k. e.

Ĉiuj ĝis nun donitaj reguloj montras al ni, kiel trovi la tagon, se oni scias la nombron en la monato (la daton); nun kiel oni trovas la daton, se oni scias la tagon? Ekzemple: hodiaŭ estas vendredo en Oktobro, — kian daton ni donos al tiu ĉi vendredo, sciante ke ĉiu tago ripetigas kvar aŭ kvin fojojn en la monato?

Tiel sciuz: se iu en la daŭro de longa tempo ne rigardis la daton, tiu ankaŭ el presita kalendaro ne scios la daton por la demandata tago, ĉar la kalendaro al ni ne povas diri, kiu vendredo en Oktobro ĝi estas; sed se li memoras, ke en unu de la lastaj tagoj ni havis ekzemple la naŭan de Oktobro, tiam al li estos facile reserĉi tiun ĉi daton sur la fingro kaj poste trovi la plej proksiman vendredon. En tia okazo ni diras: Oktobro, la deka monato, komenciĝas sur la punkto, kiu estas signata per la unua litero de la deka vorto de nia frazo („Al“, t. e.: A estas la 1a kaj 8a, B — la 9a de Oktobro; kaj ĉar E en tiu ĉi jaro 1890 estas dimanĉo, tial B aŭ la 9a de Oktobro estos ĵaŭdo kaj la sekvanta vendredo estas la 10a.

Ĝi okazas iafaje, ke oni volas difini la tagon por ia dato en malproksima jaro, por kiu difini la punkton de dimanĉo estas ne facile kaj eĉ lacige. En tia okazo (konsiderante, ke ĉiu simpla jaro havas unu superfluan tagon super la nombro de semajnoj kaj la superjaro havas ilin du) ni devas la nombron de ĉiuj tiuj ĉi superflujaj tagoj, kiuj sin trovas en la intertempo inter la kuranta jaro kaj la serĉata, dividi je sep, t. e. tiujn ĉi tagojn turni en x semajnojn, kaj la resto al ni montros, je kiom punktoj ni devas ŝovi la punkton dimanĉan (laŭ ordo alfabeto). Se la divido fariĝis sen resto, tiam la punkto dimanĉa en la serĉata jaro estas tiu sama, kiel en la kuranta jaro.

Pri la negacio.

En ĉiuj projektoj de lingvo tutmonda faritaj ĝis hodiaŭ oni povas vidi nun du karakterajn ecojn, kiuj estas komunaj al ĉiuj sen escepto, kiel ia aksiomo akceptita sen disputo. Sed kiel ekzemple en la unuaj hipotezoj astronomiaj oni ĉiam deiradis de l' aksiomo, ke la tero estas fiksa kaj ĉiuj aliaj mondkorpoj sin turnas ĉirkaŭ ĝi, kio tamen estas erara, kiel ni nun scias, tiel same en la lingvaj demandoj ni vidas tielajn aksiomojn, kvankam oni ilin tute ne devus akcepti sendispute, kiel oni ĝin ordinare faras. Unu el tiuj aksiomoj estas la uzado de l' unuobla negaciono. Sed ĝi estus multe pli komoda kaj pli nature havi duoblan negacionon. Por tio parolas du gravaj kaŭzoj. Se mi prenos unue la mul-tecon da lingvoj, kiuj havas la duoblan negacionon kaj tiuj, kiuj havas unuoblan ni trovos, ke ĉiuj slavaj kaj romanaj lingvoj havas duoblan negacionon kaj nur la germanaj unuoblan. Lingvoj de iaj aliaj radikoj ne povas esti kalkulataj, ĉar la plej granda parto de la civilizitaj popoloj apartenas al unu el la diritaj tri grupoj. — Tiel same ni donos la prefercon al

la duobla negaciono, se ni rigardos la demandon de l' flanko historika en la naturaj lingvoj. La plej disvolvitaj lingvoj el la nun ekzistantaj estas sen dubo la romanaj. Ni do rimarkas, ke ili ĉiuj havas la duoblan negacionon, dum la latina, el kiu ili naskis, ĝin ne havas. Kion tio signifas? Videble, ke ĝi estis pli komoda uzi dufoje la negacionon ol unufoje! Se nun ni alportos atenton al tio, ke la nunaj literaturaj lingvoj romanaj estas nenio alia ol malmulte ŝanĝita dialekto de l' popolo el tiuj tempoj, kiam la edukitaj paroladis latine, tiam ĝi ŝajnos interesa rigardi la nunan popoldialekton en tiaj lingvoj, kiuj ne havas la duoblan negacionon. Tiuj nun estas la lingvoj germanaj kaj la lingvo angla (miksaĵo de germanaj kun romanaj) kaj kion do ni trovas tie. Ni ĉie vidos, ke la needukita germano aŭ anglano uzos la duoblan negacionon „ich habe niemals nicht gesehen“. J have n't none. J never see'd none. El tio ni vidas, ke la duobla negaciono estas postulo kaj bezono de l' nuna tempo kaj de la pli balda estonteco, ĉar ĉiuj lingvoj kun la tempo asimiligas al la popola dialekto, tiel ke ni povas esperi, ke post unu centjaro ankaŭ en ĉiuj germanaj lingvoj estos nur duobla negaciono. Kial do ne sekvi tian signodonon, kiun montras al ni la vivantaj lingvoj ĝi estas necesa, ergo ĝi estas bona kaj natura kaj jam latina proverbo diras „naturalia non sunt turpia“ tial „Retournons à la nature“.

22. Nov. 1890.

E. Wahl.

La deveno de la virino.

(Hinda legendo.)

Kiam la ĉiopova Megadevo kreis la belegan Hinduĵon, li deflugis sur la teron, por ĝin admirari. De lia flugo eklevis sin varma, bonodora vento. La fieraj palmoj klinis antaŭ Megadeva siajn suprojn, kaj ekfloris sub lia rigardo la puraj, blankaj, delikataj, aromaj lilioj. Megadeva deŝiris unu el la lilioj kaj ĵetis ĝin en la lazuran maron. La vento ekŝancelis la kristalan akvon kaj enkovris la belegan lilion per blanka ŝaŭmo. Minuto — kaj el tiu ĉi bukedo de ŝaŭmo ekfloris la virino — delikata, bonodora kiel la lilio, facila kiel la vento ŝanĝa kiel la maro, kun beleco, brilanta kiel la ŝaŭmo mara, kaj rapide pasanta, kiel tiu ĉi ŝaŭmo.

La virino antaŭ ĉio ĉkrigardis en la kristalajn akvojn kaj ekkriis:

— Kiel mi estas belega!

Poste ŝi ekrigardis ĉirkaŭen kaj diris:

— Kiel la mondo estas bela!

La virino eliris sur la bordon seka el la akvo (de tiu-ĉi tempo la virinoj ĉiam eliras sekaj el la akvo.)

Je l' vido de la virino ekfloris la floroj sur la tero, kaj el la ĉielo sur ŝin ekcelis miljarde da scivolaj okuloj. Tiu-ĉi okuloj ekbrulis per ekstazo. De tiu ĉi tempo lumas la steloj. La stelo Venus ekbrulis per vivo — pro tio ŝi lumas pli forte ol multaj aliaj.

La virino promenadis tra belegaj arbaroj kaj herbejoj, kaj ĉio silente estis ravita de ŝi. Tio ĉi ekunigis la virinon. La virino ekkriis:

— Ho, ĉiopova Megadeva! Vi kreis min tiel belan! Ĉio estas ravita do mi, sed mi ne aŭdas, ne scias pri tiuj ĉi ravoj, ĉio estas ravita silento!

Ekaŭdinte tiun ĉi plendon, Megadeva kreis sennombrajn birdojn. La sennombraj birdoj kantadis ravajn kantojn al la beleco de la belega virino. La virino aŭskultis kaj ridetis. Sed post unu tago tio ĉi ŝin tedis. La virino ekenuis.

— Ho, ĉiopova Megadeva! ekkriis ŝi, al mi oni kantas ravantajn kantojn, en ili oni parolas, ke mi estas belega. — Sed kia beleco tio ĉi estas, se neniu volas min ĉirkaŭ preni kaj karese sin alpremi al mi!

Tiam la ĉiopova Megadevo kreis la belan, fleksan serpenton. Ĝi ĉirkaŭprenadis la belegan virinon kaj rampis apud ŝiaj piedoj. Duontagon la virino estis kontenta, poste ekenuis kaj ekkriis:

— Ah, se mi precize estus bela, aliaj penus min imite. La najtingalo kantas belege, kaj la kardelo ĝin imitas. Kredeble mi ne estas jam tiel bela!

La ĉiopova Megadeva por kontentigo al la virino kreis la simion. La simio imitis ĉiun movon de la virino, kaj la virino ses horojn estis kontenta, sed poste kun larmoj ŝi ekkriis:

— Mi estas tiel bela, tiel belega! Pri mi oni kantas, oni min ĉirkaŭprenas, rampas apud miaj piedoj kaj min imitas. Oni min admiras kaj min envias, tiel ke mi eĉ komencas timi. Kio do min defendos, se oni ekvolos fari al mi el envio malbonon?

Megadeva kreis la fortan, potencon leonon. La leono gardis la virinon. La virino tri horojn estis kontenta, sed post tri horoj ŝi ekkriis:

— Mi estas belega! Oni min karesas, mi — neniu! Oni min amas, mi — neniu! Mi ne povas ja ami tiun-ĉi grandegan, teruran leonon, por kiu mi sentas estimon kaj timon! Kaj en tiu ĉi sama minuto antaŭ la virino, laŭ la volo de Megadeva, aperis malgrandeta, beleta hundeto.

— Kiel aminda besto — ekkriis la virino kaj komencis karesi la hundeton. V Kiel mi ĝin amas!

Nun la virino havis ĉion, ŝi je nenio povis peti. Tio ĉi ŝin ekkolerigis. Por ellasi la koleron, ŝi ekbatis la hundeton, la hundeto ekbojis kaj forkuris, ŝi ekbatis la leonon — la leono ekmurmuregis kaj foriris — ŝi surpaŝis per piedo sur la serpenton, — la serpento eksibilis kaj forrampis. La simio forkuris kaj la birdoj forflugis, kiam la virino ekkriis je ili . . .

— Ho, mi malfeliĉa! — ekkriis la virino, rompante la manojn, — oni min karesas laŭdas, kiam mi estas en bona humoro, kaj ĉiuj forkuras, kiam mi fariĝas kolera! Mi sola! Ho, ĉiopova Megadeva! Je l' lasta fojo mi vin petas: Kreu al mi tian ekzistaĵon, sur kiu mi povus ellasi la koleron, kiu ne havus la kuraĝon forkuri de mi, kiam mi estas kolera, kiu estus devigita paciencie elportadi ĉiujn batojn! —

Megadeva ekpensiĝis kaj — kreis al ŝi . . . la edzon!

(Trad. A. Gr . . . i.

Novajoj.

El la gazeto „Fränkischer Kurier“ ni represas la sekvantan reporton pri la enhavo de la lasta publika parolado de sinjoro Chr. Schmidt en la societo „Mercur en Nurnbergo“:

„Kiel ĉiuj homaj novaĵoj nur iom post iom sin levis ĝis la alteco, sur kiu ili fariĝis praktike utilaj por la homaro, tiel estas ankaŭ kun la ideo de lingvo tutmonda por internaciaj komunikigoj de la popoloj. De la tempo kiam la fondinto de la germana natura filozofio W. de Leibnitz, la plej instruita el la germanaj instruituloj de sia tempo, donis fundamenton al la ideo de lingvo tutmonda, multaj noblaj kaj memferemaj viroj sin okupadis je tiu ĉi problemoj; sed al neniu prosperis feliĉigi la mondon per la solvo de tiu ĉi problemoj, ĉar iliaj sistemoj pro la tromultego de signoj montris sin ne efektiveblaj. Sed la forto de l' tempo penas venki la disigajon. Se ĝis nun la ideo de lingvo tutmonda havis la formon de teoriaj provoj, fonditaj sur sistemoj de nombroj kaj aliaj certaj signoj, ni nun trovas la problemon solvitan laŭ la modelo de la lingvoj naturaj; ĉar Volapük estas la unua provo krei lingvon de vortoj por internacia rimedo de kompreniĝo. La entuziasmo, kun kiu la nova lingvo preskaŭ ĉie estis akceptita, montras al ni, ke ĝi respondis al efektiva bezono de la tempo. Sed tre baldaŭ montriĝis, ke

la laŭdado de la granda facileco por ellerni tiun ĉi lingvon estas trompado de si mem; ĉar se la gramatiko de tiu ĉi lingvo eĉ estas simpla, la ellernado de la vortoj estas des pli malfacila, ĉar en tiu ĉi lingvo ĉio estas love farita kaj elpensita sen punkto de apogo por nia lingva sento. Tial kiu sin okupas je la lernado de tiu ĉi lingva elpenso, ne povas esperi ian riĝigon de sia sciado de lingvoj, kaj ĉiuj liaj laboroj estas senutile perditaj de la momento kiam li ĉesas sin okupadi je tiu ĉi lingvo. Pro tiu ĉi kaŭzo ankaŭ multaj lingvistoj sciigis, ke la tuta esenco kaj konstruo de Volapük al ili ne plaĉas kaj ke eĉ estas tute superflue al la multaj ekzistantaj lingvoj krei ankoraŭ unu pli malfacilan, kiu cetera neniam kondukus al fino, ĉar ĝi, kiel elpenso, estas elmeta al la konkurado de aliaj elpensoj (kiel klare montris al ni la diversaj sistemoj stenografaj); sed ke tiu ĉi konkurado tute ne povos havi lokon, se per la kunigo de la komunajo de la ekzistantaj lingvoj, kiuj estas la portantoj de nia komuna civilizacio, estus kreita sensanĝa, firma, por ĉiuj popoloj egale akceptebla fundamento kaj sur tiu ĉi estus fondita la lingvo tutmonda, apogante sin sur la plej simplaj, akceptitaj gramatikaj leĝoj, kiuj sin jam praktike trovas en la ariaj lingvoj kaj trovas teorion klarigon en la lingva scienco. La parolanto nun montris, ke neŭtrala lingvo, konstruita laŭ tiuj ĉi principoj nun jam ekzistas en la sistemo „Lingvo Internacia“, proponita de d-ro Esperanto. — En la fino de siaj klarigoj, akceptitaj kun granda aprobo, la parolanto donis al ĉiu el la aŭskultantoj paperetojn kun la sekvantaj 2 frazoj:

Volapük:

Esperanto:

Pük bevünetik pakapälom fa vol lölik pekul:völ; abu men nonik tala, sesumü volapükels, kapälom püki lekanik =Volapük=.

La lingvo internacia estas komprenata de la tuta mondo edukita; sed nenia homo sur la tero, esceptinte la volapükistojn, komprenas la artan lingvon „Volapük“.

Dum ekster la sciantoj de Volapük neniu el la aŭskultantoj povis diveni la sencan de la teksto volapüka, tuj alvenis multaj sinjoroj, kiuj la 2^{an} frazon tute precize tradukis germane — certe senduba signo de la facila ellernebleco de tiu ĉi lingva sistemo. Tiel la sole ĝusta fundamento, sur kiu vere internacia lingvo povas atingi perfektan disvolviĝon, estas trovita, kaj oni bezonas nur energian kunlaboradon de ĉiuj interesitaj oferoj por la plej baldaŭ ebligi al la homaro la uzadon de la bonajoj de komuna lingvo rimedo de kompreniĝo. La komencon al tio ĉi donos baldaŭ konstruota rondeto de lingvosciantaj membroj de la societo Merkur sub la nomo „Internacia klubo de korespondado“.

Por la celoj de nia afero L. Zamenhof ricevis de s-ro C. Hübert el Aleksandrovska 4 rublojn. — Kune kun la antaŭe ricevita ĝi faras 9 rublojn 50 kop. kaj 20 milreĝojn.

En la lasta tempo ni ricevis la sekvantajn gazetojn kun artikoloj pri nia afero: „Fränkischer Kurier“ No. 592 (referato de la publika parolado de Schmidt); „Kurjer Warszawski“ No. 339 (pri la sukcesoj de nia afero); „Savo“ (gazeto Finlanda No. 138 (pri la esenco de nia lingvo).

Lernolibrojn kaj vortaretojn en la lasta tempo venigis: inĝeniero Brzozowski el Murom inter diversaj aliaj verkoj — 65 lernolibrojn (70 No. 1 + 10/2 + 5/41); s-ro Puĉkovski el Kjaŝta — 72 lernolibrojn (14/1 + 58/41); s-ro Schmidt el Nurnbergo — 100 vortaretojn (100/0); s-ro Sokov el Volsk — 38 lernolibrojn (10/1 + 28/41); s-ro Sirotin el Kiev — 25 lernolibrojn (25/41).

Sinjoro A. Grabowski skribas al ni, ke nun estas pre-

sataj kaj baldaŭ eliros liaj 2 novaj tradukoj en nia lingvo: „La Nova Jaro“ de Prus kaj „Janko Muzikanto“ de Sienkiewicz.

Sinjoroj Chr. Schmidt kaj W. H. Trompeter preparis kaj nun presas mezan vortaron germana-internacian, kiu havos la formon kaj grandecon de la jam ekzistanta Meza vortaro internacia-germana.

Respondoj al la amikoj.

Al s-ro D-y. En la tempo, kiam estis verkata la „Dua Libro“, la demando, ĉu oni devas diri „estas varme“ aŭ „ĝi estas varma“, ne estis ankoraŭ absolute decidita kaj la uzado de unu formo estis egale bona, kiel la uzado de la dua. Nun tiu ĉi demando iom post iom per la uzado akceptis jam decidon pli difinitan. La adjektivo difinas la substantivon aŭ la pronomon havantan sencan de substantivo (responde la demandon „kia“) kaj la adverbulo difinas la verbon (responde la demandon „kiel“). Tial ni diras: „la vetero estas bona“, „li kantas bone“. Tamen en la okazoj, kiel la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo, ni ofte ne povas decide diri, kian demandon („kia“ aŭ „kiel“) nia difino devas respondi kaj kian formon ni devas uzi. En ĉiu alia lingvo tiu ĉi duba demando estas decidata per la sankcio de l' uzado, — en nia lingvo ni konsilas uzadi en tiuj okazoj ĉiam la adverbulo; ekzemple: „estas varme“, „estas vero“, „ĝi estas vero“ (sed se la difinata „ĝi“ havas la sencan de substantivo, ĝi kompreneble devas esti uzata kun adjektivo; ekzemple: lia parolo estas mallonga, sed ĝi estas tre konvinka“. Cetero la vorton „ĝi“ ni konsilas ĉiam uzi nur en tiu ĉi lasta senco, t. e. nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel „li“ anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton „ĝi“ (ekzemple „hodiaŭ estas varme“ kaj ne „hodiaŭ ĝi estas varme“); tiam la duboj en la uzado de la adjektivo aŭ adverbulo per si mem defalos.

Al s-ro M--v. Ni uzas ordinare la formon „konatiĝi“ (= fariĝi konato kun iu), sed ankaŭ la formo „konigi“ estas tute bona (= fari sin koni ion). En la plena vortaro ni donis la vorton „krom“; sed poste, vidante ke kelkaj amikoj per la vorto „ekster“, kiu ekzistas en la malgranda fundamenta vortareto, kvankam sub iom alia senca nuanco, tute bone esprimas ankaŭ la sencan de „krom“, ni komencis ankaŭ uzadi tiun ĉi vorton en la senco de „krom“.

Al s-ro C--v. Inter la esprimoj „doni po 2 pecojn“ kaj „doni po 2 pecoj“ estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzablaj kaj bonaj. Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto „po“ la „pecoj“ jam ne dependas rekte de la „doni“, ni konsilas uzi post „po“ (tiel same kiel post „da“) la nominativon („doni po 2 pecoj“). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio „ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon.“

Al s-ro M--n. Ĉiun, kiu volas ke lia opinio aŭ projekto estu presita en nia gazeto, ni petas: 1) ke li sendu ĝin al ni en formo de aparta kaj preta gazeta artikolo kaj ne en letero kune kun diversa aliaĵo; 2) ke la artikolo estu skribita pure kaj tute klare legeble, por ke ni ne devu ĝin transskribi; 3) ke la artikolo estu skribita nur sur unu flanko de la papero kaj ne sur la ambaŭ flankoj.

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Januaro 1891.

№	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predi-slovie i polni učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa)	15 kopekoj
2.	— Jezdk Mieczynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola)	15 kop.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca)	20 kop.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana)	20 kop.
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla)	20 kop.
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj	3 kop.
7.	— por Poloj	3 kop.
8.	— por Francoj	3 kop.
9.	— por Germanoj	3 kop.
10.	— por Angloj	3 kop.
11.	D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto)	25 kop.
12.	D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto)	10 kop.
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea)	20 kop.
13.	A. Grabowski. La Neĝa Blovado Rakonto de Puŝkin (en Esperanto)	15 kop.
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto	50 kop.
16.	N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de la Lingvo Internacia“	25 kop.
17.	D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia	1 rublo.
18.	N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua libro“	10 kop.
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto)	15 kop.
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia	25 kop.
21.	D-ro Esperanto. Mezza vortaro internacia germana	25 kop.
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto transladet by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator	50 kop.
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana	20 kop.
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda)	20 kop.
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget	25 kop.
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana.	3 kop.
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda	3 kop.
28.	Klubo Nürnbergga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weitsprache-Verein	25 kop.
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch)	60 kop.
30.	Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero No. 1	25 kop.
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1	10 kop.
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana	3 kop.
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana)	25 kop.
34.	M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara)	50 kop.
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala)	25 kop.
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana)	20 kop.
37.	A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto)	30 kop.
38.	A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita)	
39.	Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinarodni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema)	25 kop.
40.	D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta)	20 kop.
41.	L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj)	10 kop.

Ĉiuj supre diritaj verkoj povas esti ricevataj de
L. Zamenhof (Varsovio, str. Nowolipki No. 21) aŭ de la
librejo Heerdegen-Barbeck en Nürnbergo.

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de signoj de poŝto.

Ĉiuj kasitaj signoj de poŝto estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por ĉiuj
presaj laboroj.